# Resto-racie – rolludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Ekzercado de parolkapablo, ankaŭ en neantaŭvidebla situacio |
| **Celgrupo:** | mezniveluloj, progresantoj |
| **Antaŭpreparo:** | Priskribo de la situacio laŭ la rolantoj (vidu la aldonajojn) – eblas nacilingve! |
| **Tempo:** | Preparado 5-10 min., prezenrado 5 min. |
| **Ludantoj:** | Minimume 4 (prefere 7-8) personoj |

Ĉiu ludanto ricevas aŭ elektas unu slipeton kun sia nova rolo.

Li/ŝi prepariĝas al la ludo (kontrolas la vortojn, laŭnecese petas helpon, eble eĉ surpaperigas kelkajn frazojn. )

Je la komenco la ludgvidanto nur konatigas la rolantojn, indikas la lokon, tempon (ekz. : *vendrede vespere, luksa restoracio*), la roloj de la aliaj personoj evidentiĝas nur dum la prezentado.

La ludgvidanto ne havas apartan rolon, sed laŭnecese helpu, foj-foje eĉ provoku por ke la ludo havu sian ritmon.

Ĉe la rolludoj - malgraŭ la komenca prilaboro de la teksto - la rolantoj sufiĉe baldaŭ staras antaŭ neatendita situacio, el kiuj ili devas iel eliri. Plej ofte kun sukceso, ĉar jam ili mem estas interesataj en la ludo, senĝene, sprite ili povas solvi la malfacilajn situaciojn.

Krom "provokado" kaj klarigo, ni ne helpu, ne donu konsilojn! Ni vidos, kiel variaj, ofte tre spritaj solvoj naskiĝas!

La roloj troviĝas sur la sekva paĝo, kiun vi povas printi, multobligi kaj tondinte disdoni la slipetojn kun la rol-indikoj.

Rolludo – En restoracio - A

Vi invitas viajn gekolegojn al luksa restoracio – por tragmanĝi aŭ vespermanĝi - , pro la okazo, ke vi hodiaŭ estis nomumita direktoro kun duobla salajro. Ekde nun vi estros viajn ĝis nunajn gekolegojn. Kompreneble ĉiuj rajtas mendi manĝaĵon kaj trinkaĵon laŭplaĉe.

---

Rolludo – En restoracio - B (estas pluraj B-rolantoj!)

Via kolego hodiaŭ estis nomumita direktoro (kaj certe ricevos duoble pli grandan salajron ol vi!). Pro tio ŝi (li) invitis vin kaj kelkajn viajn gekolegojn por tagmanĝo (aŭ vespermanĝo) en luksan restoracion (kie kutime vi ne povus pagi manĝon). Vi ĝojas, ja vi ne devas komenci la elektadon de la pladoj atentante la prezojn, kaj subtable kontrolante vian monujon: vi povas manĝi kaj trinki tion, kio plaĉas al vi!

---

Rolludo – En restoracio - C

Kelknombra kompanio alvenas al tiu eleganta restoracio, kie vi estas la ĉefkelnero. Ili volas tagmanĝi (vespermanĝi). Proponu al ili viajn plej bongustajn specialaĵojn, kuriozajn vinojn kaj trinkaĵojn!
Interesiĝu intertempe, ĉu ili estas kontentaj, ĉu plaĉas la prezentitaj pladoj, ĉu ili deziras ankoraŭ ion; kafon, deserton… Estu aparte ĝentila, ja videble ili lasos ĉe vi multe da mono!
Estu ĝentila ankaŭ ĉe la pagigo, kiel decas en unua-klasa restoracio.

---

Rolludo – En restoracio - D

Vi estas posedanto de entrepreno, kie vi hodiaŭ matene nomumis novan ĝeneralan direktoron. Vi scias, ke li/ŝi ĝuste nun festas tion en restoracio. (Lasu ke la ludo iom disvolviĝu dum kelkaj minutoj kaj poste) vi telefonas al la restoracio kaj petas la kelneron, ke li venigu al la telefono la "**ĝeneralan direktoron**" (rolulo A) de la entrepreno. Al tiu vi diru, ke estas iu bagatela problemo rilate la nomumon, necesas tamen **tuj** rearanĝi ĝin kaj por tio la freŝbakita direktoro senprokraste revenu al la entrepreno.